

Literaturaj perloj
Prelego pri la fundamentaj elementoj de esperanto laŭ Raymond Schwartz
Claude Gacond, 243-a radioprelego, 1968.05.05 & 08

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Dum la someraj monatoj ni interrompos nian studon pri la disvolviĝo kaj realiĝo de la mondlingva ideo por alia pli ripoziga temo.

A.- Ni ĵetos rigardon al nia literaturo provante trovi kurtajn tekstojn, kiujn ĉiuj esperantistoj devus koni.

Cl.- Tiu serĉado havos tri celojn :

a) Pruvi, ke la internacia lingvo posedas verajn literaturajn juvelojn.

b) Veki deziron al pli intima kono de la literaturo, kiu naskis tiujn trezorojn.

c) Instigi la instruistojn meti la gelnantojn en kontakton kun tiuj perloj, kaj veki ĉe ili admiron kaj eĉ entuziasmon por tiuj artaĵoj.

A.- La amo al la lerneja lingvo estas ofte la rezulto de tiuj renkontoj kaj intimaj kontaktoj kun beleto. Nia amo al la lingvo internacia same estu intimiĝo kun ĝiaj plej belaj fruktoj.

Cl.- Por komenci per la komenco ni legos hodiaŭ al vi skeĉon de Raymond Schwartz, kiu estas titolita :

A.- Prelego pri fundamentaj elementoj de Esperanto.

Cl.- « Gesinjoroj ! Iun aŭ alian tagon ĉiu el vi fariĝos akademiano. Tiam ne estos senutile koni la plej kaŝitajn sekretojn de nia lingvo.

A.- Kaj tial ni decidis malkaŝi antaŭ vi tiujn mirindaĵojn. Bonvolu nin sekvi !

Cl.- Kompreneble ni komencos per la komenco,

A.- tio estas :

Cl.- per la **alfabeto**.

A.- Gesinjoroj – la esperanta alfabeto estas stranga fenomeno. La plej sagacaj sciencistoj ne scias ekzakte, al kiu fako la alfabeto apartenas.

Cl.- Multaj kalkulas ĝin inter la legomoj.

A.- Ili pretendas, ke ĝi estas el la familio de la betoj, kiel, cetere, ĝia nomo atestas : **alfa beto**.

Cl.- Aŭ ili pedante ĝin subordigas al malgranda fabo,

A.- tio estas :

Cl.- **al fabeto**.

A.- Ni, kontraŭe, asertas, ke la alfabeto ne apartenas al la **legomoj**, sed al la homoj, kiuj legas. Ĝi apartenas al la

Cl.- **leg-homoj**.

A.- Ĉu vi kaptis la nuancon ?

Cl.- Lastatempe oni renkontas ankaŭ modernajn filologojn, kiuj klasifikas la alfabeton inter la meblaro.

A.- Laŭ ili, la alfabeto estas meblo, ĉar ĝi estas lito konsistanta el 28 **lit-eroj**.

Cl.- Ĝi estas tuta meblaro, ĉar, efektive, per simpla kunmeto de diversaj literoj oni konstruas plej diversajn meblojn.

Literaturaj perloj
Prelego pri la fundamentaj elementoj de esperanto laŭ Raymond Schwartz
Claude Gacond, 243-a radioprelego, 1968.05.05 & 08

A.- Ekzemple :

Cl.- **k** plus **m** plus **d** egalas **komodo** ; **s** plus **f** egalas **sofo**, kaj tiel plu.

A.- Tiu klasifiko ŝajnas akceptebla.

Cl.- El la diritaj 28 literoj oni iom post iom kunmetis vortojn, formis frazojn, produktis librojn.

A.- Estas preskaŭ nekredeble, kiom da volumoj oni sukcesis plenigi per tiuj kelkaj literoj.

Cl.- Se oni metus unu sur la alian ĉiujn librojn ĝis nun verkitajn, oni havus turon miloble pli altan ol la Eiffel-turo kaj nur iom malpli altan ol la Babela.

A.- Kaj tiu turo, konsistanta el nur malmultaj literoj, fakte ekzistas.

Cl.- Oni nomas ĝin la **Litera Turo** !

A.- Elĉerpinte tiel ĝisfunde la sekretojn de l'alfabeto, ni nun parolos pri la proksima paragrafo ; la artikolo.

Cl.- Estus insulto klarigi al vi, kio estas artikolo.

A.- Artikolo troviĝas en ĉiuj gazetoj. La plej mallongaj ĝenerale estas la plej bonaj.

Cl.- Tiurilate ankaŭ, ni rememorigu saĝan konsilon de nia Fundamento, kiu bedaŭrinde ne estas sufiĉe atentata :

A.- « *La personoj, por kiuj la fuŝado de artikolo prezentas malfacilaĵojn, povas en la unua tempo tute ĝin ne fuŝi.* » Fundamento paragrafo unua.

Cl.- Kaj nun, gesinjoroj, antaŭ ol fini, ankoraŭ kelkajn vortojn pri la kazoj :

A.- *La kazoj estas la formoj de la deklinacio.*

Cl.- Sed ne konkludu, ke **kazo** estas sinonimo de **formo**.

A.- Neniam diru :

Cl.- « *Tiu fraŭlino havas agrablajn kazojn.* »

A.- Ĉar, kiam vi interesiĝas pri la formoj de fraŭlino, tio koncernas ne la **kazon**, sed

Cl.- la **kason** !

A.- Ĉu vi kaptis la nuancon ?

Cl.- En esperanto ekzistas nur du kazoj : **nominativo** kaj **akuzativo**.

A.- Erare kelkaj soifuloj aldonas la **aperitivon**.

Cl.- La aperitivo ne estas kazo, sed nur okazo,

A.- jes, okazo por trinki.

Cl.- Kaj tiun ĉi okazon, gesinjoroj, mi volonte profitos... »

A.- Tiun skeĉon de Raymond Schwartz, kiu estas titolita **Prelego pri fundamentaj elementoj de Esperanto** vi povas relegi en *La Ĝoja Podio*.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !

-oOo-